



# PILO-PRESS

Internacia  
Informservo

## Subtenu la Informadon

Abonu Pilo-Press  
kaj Eŭropan Espe-  
ranto-Revuon!

Eidonanto/Herausgeber:  
Ludwig Pickel  
Posifach 2113  
D-85 Nürnberg  
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 23/1975 19 junio 1975  
Aperas ĉiusemajne

### Germana Esperanto-Instituto

#### Citaĵoj el la kuratori-kunsida protokolo

Oberkirch/Hamburg (pp) La kuratorio de la Germana Esperanto-Instituto kunsidis la 18an de majo 1975 kadre de la Germana Esperanto-Kongreso en Oberkirch. Ĉeestis 12 el 17 kuratorianoj, s-ro Tucker kaj kelkaj gastoj.

El la protokolo ni citas:

#### Punkto 1: Stato de laborado

S-ro H. Schmid (Augsburg) aŭdigas sonbendon de fakestro pastoro Burkhardt pri la biblioteko. Li ordigas la 3.000 titolojn kaj deziras vizitojn de interesitoj. Katalogo estas pretigata.

S-ro Tucker raportas pri la ekzamenoj: tiu servo bone funkcias. Post detala diskuto estas decidite:

- a) Al la sekvontjara kunsido de la kuratorio dum aprilo 1976 en Eindhoven/Nederlando s-ro Tucker prezentos modifitan regularon por ekzamenoj, kiu prenas en konsideron la spertojn el 7 jaroj da aplikado. Li verkos sian proponon helpe de ekzamenantoj, kun kiuj li jam nun korespondas tiucele.
- b) Sinanonco por ekzameniĝo estas ekde nun ebla ankaŭ sen formalajoj.
- c) La ekzamenkotizo por junuloj ĝis 25 jaroj kaj studentoj estas ekde nun 3 resp. 7 DM, kaj restas la kotizo por la atestilo.

La direktoro substrekas la signifon de tre preciza apliko de ĉiuj reguloj, ĉar nur tiel la ekzamenoj de la Instituto povas esti reputaciaj.

#### Punkto 2: Planita broŝuro

Post detala diskutado estas decidite:

- a) Nepre la broŝuro kombinu la ekzamenan regularon, kiun certe tre multaj esperantistoj deziras posedi por daŭro, kun la aliaj, ĝeneralaj informoj.
- b) La enhavo skizita de la direktoro la 31-an de marto 1975 estas aprobita.
- c) Ĉar la ekzamena regularo estos novformulita, la broŝuro aperu en aprilo 1976. La sekvontjara kunsido de la kuratorio do decidus pri la tuto.

### Bavario demandas Bonn

München (pp) "Bayern fragt Bonn" (Bavario demandas Bonn) estas politika elsendoprogramo de la Bavara Radio, en kiu politikistoj el Bonn respondas al telefonaj demandoj de aŭskultantoj. En la elsendo de la 10a de junio Rupert Sittl, München, faris demandon pri Esperanto al la ŝtata sekretario de la ministerio pri klerigo kaj scienco. Laŭ informo de Günther Conrad, kiu aŭskultis la elsendon, la demando kaj respondo estis sufiĉe pozitiva por Esperanto.

### Pilo-Press

Internacia Informservo, Jara abonkotizo 30 GM. Pagu al Ludwig Pickel, D-85 Nürnberg 1, PSchK Nürnberg 819 56-851

Eŭropa kooperad-projekto Pedagogiko - Interlingvistiko -

Kibernetiko                      Daŭrigo kaj fino

5. Avantaĝoj por la partoprenantaj sciencistoj

5.3 La interlingvistikuloj dekomence disponas pri planlingvaj scioj. Kie tio ankoraŭ ne validas por pedagogoj pri kibernetiko, oni povas tiujn sciojn sufiĉe bone atingi (ekz-e helpe de la instruprogram-libro de Behrmann) dum 20 - 30 studhoroj. Per tio forfalos la lingvaj malfacilaĵoj respektive lingve kaŭzitaj diskriminacioj alie daŭre aperantaj ĉe internaciaj kooperad-projektoj.

6. Avantaĝoj por partoprenantaj ĝelernantoj

6.0 Antaŭ la komenciĝo de planlingvo-instruado oni prezentas ties diversajn avantaĝojn al la ĝelernantoj kaj iliaj gepatroj en taŭga maniero. La pedagogaj avantaĝoj tie havas antaŭrangon antaŭ la kibernetaj. Spertoj montris, ke almenaŭ en okcidentaj landoj oni ne aŭ nur alude menciis la politikajn avantaĝojn, kaj ke oni menciis la kulturajn kaj filantropajn avantaĝojn nur tiam, se oni estas eksplicite demandata pri tio. (En FRG kaj Francio montriĝis taŭga la preskaŭ ekskluziva limigo al raciaj argumentoj favore al planlingvo-instruado.)

6.1 (Lingvistika) planlingvo estas didakta fremdlingvo-modelo, kiu konsiderinde plifaciligas la postan ellernon de diversaj fremdlingvoj. Ĉe la ekzemplo de la Lingvo Internacia ("Esperanto", Szerdahelyi pruvitis tion laŭkvante. Ĉefe la atingita tempo-ŝparo ĉe la lernado de Eŭropaj fremdlingvoj estas pli granda ol la antaŭa tempo-investo por la planlingvo-instruado. Ankaŭ la gepatro-lingvaj kapabloj oni pozitive influas per planlingvo-instruado, kaj aparte estas atingebla en multaj kazoj reduktiĝo de legasteno. Probable la planlingvo-instruado kaŭzas pozitivan transferon al aliaj studfakoj kaj plialtigon de la logika kaj krea pens-kapabloj; detalojn oni akiru dum la projekt-procedado. Kiel pedagogan avantaĝon - ĉefe al la vidpunkto de la gepatroj - oni ankaŭ rigardu la decidhelpon, kiun oni ricevas el la individuaj spertoj en la planlingvo-instruado por la pli posta elekto de fremdlingvo.

6.2 La sinlimigo de planlingvo al komunikad-teorie necesaj eroj igas ĝin ne nur efika fremdlingvo-modelo, sed ankaŭ pli komforta objekto por la aŭtomata lingvotraktado per kibernetaj sistemoj, ĉefe per detumiloj (ekz-e ĉe la aŭtomata dokumentado). Pro tio oni devas elmontri interligon inter la planlingvo- kaj la informadiko-instruado. Plua logilo kibernetflanka por la plimulto de la partoprenantaj lernejoj estos pli ol kutima profitado de la klerigteknologio en la planlingvoinstruado.

6.3 Se oni volas nepre menci la politikajn avantaĝojn de planlingvo, tiam temu pri la protektado de la gepatra lingvo, la ŝanckvilibro en internacia kunlaborado kaj la ebligo de senkromvoja kaj ne nur unudirekta interkompreniĝo ankaŭ por la bazo.

6.4 Se demandoj venas, oni povas menci la planlingvan literaturon (40 000 volumoj, meze unu nova volumo tage), la specialajn libroservojn kaj bibliotekojn, la regulajn planlingvajn radioelsendojn de Eŭropaj kaj ekstereŭropaj sendstacioj kaj la eblecon aliĝi al planlingvaj societoj (UEA, SAT k.a.) kaj utiligis iliajn turismajn, publicajn, filatelistajn kaj aliajn servojn. Sed oni scias, ke ĉia traktado de la pac-subtena efiko asertata de tiuj grupoj kondukas pli facile al skeptiko ol al

malfermiteco pri la planlingvo-instruado. Malgraŭ tio klerig-praktika kunlaborado kun tiuj grupoj estas utila ĉe certaj temoj de la projektoj kaj en unuopaj landoj. En aliaj kazoj oni preferu alstrebu kunlaboron, ekz-e la organizadon de internacia lerneja korespondado kaj lernegaj renkontiĝoj, kun planlingve neŭtrala grupiĝo ( t.e. grupiĝo kiu permesas senpartiecan komparon de diversaj planlingvoj), ekz-e kun la "Societo pri lingvolim-transpaŝa Eŭropa interkompreniĝo", kvankam el didaktaj, klerig-ekonomiaj kaj kibernetaj kaŭzoj la kooperad-projekto prenis kiel unuecan bazon la Lingvon Internacian. -

## 7. Financado

EKPIK havas nek komunan projekt-estron nekkomunan financadon. Grandparte ĝi estas realigata per la kapacito de la partoprenantaj esplor-institutoj kaj lernejoj. Plifortigo de tiuj ĉi kapacitoj provizore en nacia kadro estas aspirata per la koncernaj subvenci-institucioj kaj -direktivoj. Oni klopodos akiri la krome necesajn rimedojn por la internacia koordinado de la projekt-procedado el la buĝetoj por la realigo de interŝtataj kultur-kontraktoj kaj de internaciaj kompetentaj institucioj aliflanke (ekz-e de UNESCO).

D-479 Paderborn, la 20-an de majo 1975

\*\*\*\*\*

### Komuna Esperanto-aranĝo Aŭstrio - Bulgario

Wien (pp/w.m.) Sabate, la 7an de junio, okazis komuna Esperanto-aranĝo de Aŭstria Esperantista Federacio kaj Societo por internaciaj kontaktoj - Esperanto-amikoj kun la Aŭstria Bulgara Societo en la plenplena festsalono de la Bulgara Kulturdomo, Wien IV, Schwarzenbergplatz 10.

D-ro Nikola Nedeff, ĝenerala sekretario de la Aŭstria Bulgara Societo, en Esperanto salutis la multnombre venintajn gastojn, i.a. ankaŭ reprezentanton de UNIDO. En nomo de A E F parolis ties honorprezidanto, senata konsilisto d-ro L. Grimme, dankante pro la afbla gastigo kaj atentigante pri la popolojn interliganta rolo de Esperanto kaj de la esperantista agado.

Raportis poste pri la "Traka Ekspozicio" nuntempe en Vieno, laŭ la koncerna teksto, prezentita en la Mallongonda Esperanto-elsendo de Radio Vieno, prof. d-ro K. Beckmann, prezidanto de A E F, kaj Emil Vokal, vicprezidanto de AEF; lastnomita ankaŭ komunikis la "Esperantokalendaron" por la sekvonta tempo.

Valoraj kontribuajtoj muzikaj (verkoj por fortepiano kaj violonludoj de polaj kaj klasikaj majstroj) de la artistoj Maria Bajdanova, Andreana Turtova, Nikolai Turtov kaj Herbert Mogg inde pliriĉigis la impresplenan posttagmezan aranĝon, kiu finiĝis per agrabla kunestado.

AEF kaj Societo por internaciaj kontaktoj aranĝis ĉi-jare jam similajn kunvenojn kulturcelajn ekz. en la Dana Klubo kaj en la Pola Instituto de Vieno, tiel servante al internacia alproksimiĝo kaj interkoniĝo.

### Gemeliĝa urbo serĉata

Esperantogrupo Reigate, Britio, serĉas por sia urbo Reigate ĝemeliĝan urbon en FRG en interkonsento kun la urbestro. Interesuloj: skribu al S-ro G. Stephenson, sekretario de Reigate Esperantogrupo, 2 Shagbrook Cottages, Buckland Rd., Reigate, Surrey, RH2 9RE, Britujo.

Esperanto en la radio

Varsovio. Pola Radio ricevis entute 9 514 respondojn al la demando "Kiaj pensoj venas al vi lige kun la proksimiĝanta 30a datreveno de la venko super faŝismo kaj finiĝo de la dua mondmilito?" okaze de la konkurso. Inter la respondintoj estis 728 aŭskultantoj de la Esperanto-redakcio. Inter la gajnintoj de la ĉefpremio "Dektaga vojaĝo tra Pollando" troviĝas du esperantistoj.

En la Esperanto-Ekspreso oni povas aŭdi i.a.: Intervjuon kun finno, kiu kune kun grupo de junaj finnaj esperantistoj restadis en Varsovio. Intervjuis Jerzy Grum. La finna grupo rondiris la urbon laŭ la Zamenhofa vojo de Varsovio.

En la feriado de Miedziedroje, kiu komenciĝis la 16an de junio, partoprenas 48 eksterlandaj kaj 74 polaj esperantistoj. Andrzej Pettyn dum la feriado gvidas kurson.

Berno. S-ro Gacond intervjuis merkrede, la 18 jun, la gvidantojn de la Svisa Asocio de Esperantistaj Fervojistoj, kiu la 16.9.75 povas festi ŝian 50an datrevenon de fondiĝo. La intervjuitoj estis Hans Hunkeler kaj Ernst Glättli. Venontsemajne oni daŭrigos la intervjuon.

Vieno. El la semajna komentario de d-ro Alfred Macher ni citas jenajn frazojn: "La aŭstroj trapasis teruran sorton, do ili pretos, verŝajne, oferi tiun monon por la sekureco de si mem kaj de siaj infanoj. Des pli ĉar la Porpaca Instituto en Stockholm ĵus vidigis al ni, ke vetarmante la mondo elspezis pasintjare 210 miliardojn da dolaroj. Eĉ la tiel nomata Tria Mondo altigis siajn aketojn de armiloj je 40 procentoj. Sajnas, ke nur per armado oni povas konservi la pacon - leciono, laŭ kiu la aŭstroj probable sintenos."

En la kultura parto de la elsendo oni aŭdis artikolon pri la nobelpremiita pacbatalinto Alfred Hermann Fried, kiu eldonis en la jaro 1903 Esperanto-lernolibron por germanlingvanoj.

La leterkesto ne nur menciis la nomojn de la korespondantoj, sed informis ankaŭ pri aktualaj aferoj de la Esperanto-movado.

Romo. La elsendoj de Radio Roma nuntempe estas relative bone aŭdeblaj, speciale sur ondolongo 41 m. Tion ankaŭ konfirmis Günther Conrad, München. La dimanĉa programo konsistis el Novaĵoj el Italio, Kuriero de Esperanto, Leterkesto. Cetere la Esperanto-redakcio de Radio Roma faris interesan statistikon pri la ricevitaj korespondaĵoj en 1975. La komuniko tekstas jene:

"La 28-an de majo ni povis listigi, kun granda ĝojo, la 500-an korespondaĵon de la jaro 1975-a.

Ni sincere dankas ĉiujn, kiuj skribis, kaj tiel multe helpis nin en nia laboro. Samtempe ni esperas, ke ankaŭ estonte nia korespondado estos same vigla.

Por la plej fidelaj aŭskultantoj, ni havas je dispono ekzemplerojn de luksa libro pri Italujo, en la lingvoj germana, hispana kaj franca.

Laŭ landoj, niaj 500 korespondaĵoj estas tiel listigitaj:

Germanujo (Federacia Respubliko)	79	Belgujo	16,	Jugoslavio	16
Francujo	68	Finnlando	14,	GDR	12,
Italujo	62	Ĉeĥoslovakio	10,	Hispanujo	10,
Nederlando	32	10,	Bulgario	9,	Norvegujo
Britujo	28	5,	Argentino	5,	Portugallio
Hungarujo	28	5,	Argentino	5,	Portugallio
Germanujo	23	Sovetunio	3,	Brazilo	2,
Pollando	18	Kanado	2,	Kolombio	1,
Aŭstrujo	16	Monako	1,	Rumanujo	1,
		Usono	1		

Entute 500 el 33 landoj."